


V-01002/3

(1923)

N 420

SPECIMEN



No. 20.

LITERATURO

ENHAVO

*El la Redaktejo—La Amo al
la Metio—Kial la Bestoj ne
Povas Paroli—Hindaj Moroj
kaj Kutimoj—La Mortigo de
Downie—Literatura Fako*

Oktobro—Decembro, 1923

INTERNACIA

VENPAS
BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,
17, MARK STREET, LONDON, W.C1.

ZAMENHOFA

“LITERATURO”

Kvaronjara Gazeto Esperanta

Adreso de la redakcio kaj administracio:

**B.E.A., 17, Hart Street, London, W.C. 1,
Anglujo.**

ABONO.—Afrankite: por unu jaro, 2\$. , aŭ 2½ svisaj frankoj: unu numero 6p., aŭ 3 respondkuponoj.

REKLAMOJ KAJ ANONCOJ.—Por prezoj skribu al la administracio.

REDAKCIO.—Manuskriptojn, k.t.p., oni bonvole sendu al la Redakcio. Tradukantoj antaŭ ol sendi siajn verkojn bonvole ĉiam certigu, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la eldonintoj permesas represigon. La redakcio rezervas al si la rajton korekti erarojn de gramatiko, stilo, k.t.p.

Oni bonvole skribu sur nur unu flanko de la papero.

La Redakcio ne garantias resendon de manuskriptoj, krom laŭ speciala peto.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukantoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k.t.p., en ĉi tiu gazeto.

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO
17, Hart Street, London, W.C. 1, Anglujo

Antaŭa Hon. Prezidanto: D-RO L. L. ZAMENHOF

Prezidanto: JOHN MERCHANT

Hon. Kasisto:

ROBERT ROBERTSON

Hon. Sekretario:

CHARLES H. EDMONDS

Sekretario: MONTAGU C. BUTLER

La Asocio konsistas el Membroj (10\$. jare), Fratuloj (21\$. jare), Asociitoj (minimumo 2\$. 6p. jare) kaj Filiigitaj Grupoj.

LA ASOCIO ELDONAS:—

British Esperantist—monate: angle kaj Esperante: sendata al Membroj kaj Fratuloj: ne aparte abonebla.

Literaturo—trimonata literatura gazeto en Esperanto: pri abonoj vidu supre: sendata senpage al Membroj kaj Fratuloj.

International Language—Monate: precipe angle: celas pri-studi la problemon pri internacia lingvo kaj rekomendas la akcepton de Esperanto kiel solvo, ankaŭ enhavas instruajn artikolojn pri Esperanto kaj aldonon por komencantoj, *La Juna Lernanto*: abono, afrankite por unu jaro, 2\$. 6p.; unu numero 2½p. afrankite.

LITERATURO

TRIMONATA GAZETO ESPERANTA

Vol. 3 Oktobro—Decembro, 1923 No. 4 (20)

EL LA REDAKTEJO

Kiel anoncite en aliaj lokoj, de la komenco de 1924 *Literaturo* apartenos al la Brita Esperantista Asocio, kaj estos liverata senkoste al ĉiu membro de la Asocio. Samtempe, ĝi estos abonebla de nemembroj, aŭ de membroj dezirantaj pluajn ekzemplerojn, po 2 ŝilingoj (aŭ 2½ svisaj frankoj) por la kvar numeroj de la jaro. Tiu aranĝo komenciĝos per la numero por Januaro—Marto 1924 (No. 21).

Ĝisnunaj abonantoj bonvolu noti la novan aranĝon. Se ili estas, aŭ fariĝos, membroj de la Brita Esperantista Asocio, ili ricevos la gazeton dum 1924 sen ia aparta avizo aŭ pago: se ne, ili estas petataj pagi la abonon dum Januaro, por helpi la administradon.

Ĉi tiu numero enhavas pluan verketon de la kataluna amiko kiu kontribuis al No. 18. La nuna peco gajnis por li Premion por Proza Traduko en la IXa Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj en Barcelono.

Ni atentigas la legantojn pri la *Literaturaj Konkursoj* anoncitaj sur la kovrilo de ĉi tiu numero. Espereble ni ricevos bonan kolekton de taŭgaj manuskriptoj, ne nur en la Traduka kaj Novela Konkursoj sed ankaŭ en la nova konkurso pri Originala Artikolo en Esperanto. Pri la Konkursaro de nun zorgos la *Literatura Komitato de la Brita Esperantista Asocio*, kiu alprenos la devojn kaj respondecon de la antaŭa Brita Literatura kaj Debata Societo.

LA AMO AL LA METIO

DE EUGENI D'ORS

Tiu amiko, mia filo, kiu venis iun matenon viziti min —ĉu vi scias? tiu en brikkolora jako,—ne estas homo sufiĉe bonkonduta. Delikata, honesta, laborema, bona patro kaj familiamanta, pri tio malmultaj superas lin. Sed tiu viro estas karikaturisto ĉe ilustrita ĵurnalo. Tio havigas al li vivrimedon, tio okupas liajn laborhorojn. Tamen li ĉiam parolas kun abomeno pri sia metio, kaj tiel ekkrias: “Se mi povus fari pentrarton! Mi devas desegni tiujn sensencaĵojn por vivi. Ne rigardu miajn desegnaĵojn! Ili estas komerco, amikoj, nur komerco” Tio signifas ke li plenumis sian laboron nur por la gajno; kaj ke li lasis sian spiriton forkuri de l' laboro, anstataŭ porti ĝis la laboro sian spiriton. Ĉar li rigardas sian laboron kiel tute sennobla. Sed via patro certigas al vi, filo, ke se la laboro de la amiko restas sennobla, se liaj desegnaĵoj povas esti juĝataj sensencaĵoj, tio estas ĝuste ĉar li ne alportis al ili sian spiriton. Kiam la spirito ĉeestas, ne estas iu laboro kiu ne iĝas nobla kaj sankta. Tielaj estas same la laboro de l' karikaturisto, kiel tiu de l' ladisto kaj tiu de la stratpurigisto, kaj tiu de la skribanto de banderoloj por dissendi ĵurnalon al la abonantoj. Estas *maniero* desegni karikaturajn, ellabori la ladon, balai la placojn, kaj skribi adresojn, kiu klare montras ke en la ago oni oferis amon, zorgon pri perfekteco kaj harmonio, kaj malgrandan fajron de persona fajro, tio kion la artistoj nomas *stilo*, kies florado ĉe neniu verko nek verketo homa estas neebla. Tiu ĉi *maniero* de laborado estas la bona. La alia, tiu kiu malŝatas la metion, opiniante ĝin sennobla, anstataŭ altigi kaj sekrete aliigi ĝin, estas malbona kaj nemorala. La amiko en brikkolora jako estas do nemorala homo, ĉar li ne amas sian metion.

Mia fileto, vi ankoraŭ ne havas tri jarojn, sed mi parolas al vi tiel, kvankam vi ne povas kompreni min, ĉar mi alparolas en vi ĉiujn viajn fratetojn, la infanojn de Katalunujo. Plie, neniam estas tempo perdita tiu kiun oni uzas aŭskultante, kun humileco, aferojn ankoraŭ

nekomprenatajn . . . Tiuj ĉi aferoj laboras nian internon, kaj tago venas kiam oni trovas ilian profiton Estu, do, kvieta; lasu viajn manetojn ripozi en la miaj; rigardu per surprizitaj okuloj kiel el mia buŝo eliras la parolo, kun ludo de lipoj kaj dentoj La vorton "spirito" mi multe diras al vi; kaj dirante ĝin al vi mi ĝin diras al ĉiuj katalunaj infanoj Ili eble demandos min, kio ĝi estas; mi respondos, ke ili ne povas scii ĝin certe kaj ke ni ne scias ĝin ankaŭ, sed estas necese ke ni parolu pri la spirito senĉese, ĉar, se ni ne komprenas ĝin, ni atingos, kompanse, kompreni nin unuj la aliajn, kaj ĉiuj kune igi nin pli bonaj.

Nu, mi diras al vi, filo, ke la amiko laboranta kiel karikaturisto ne estas morala homo, ĉar li ne estigas spiriton en sia laboro. Ankaŭ ne estas sufiĉe deca la konduto de tiu alia sinjoro, la okulvitrulo, kiu scias rakonti al vi tiel belajn rakontojn kaj kiu venas tetrinki kelkajn dimanĉojn posttagmeze. Tiu ĉi verkas por ĵurnalo, estas ĵurnalisto. Kaj li ankaŭ parolas pri sia metio kvazaŭ li estus en galeroj: "Neeble estas fari literaturon! . . . Ha, la literaturo! . . . Mi, kompatindulo, devis forlasi la literaturon!" Jes, kompatinda, sed ne pro tio kion li supozas. Kompatinda, ĉar li ne scias kunigi sian amon al la literaturo kun la laboro de li farata. Li plendas pro tio ke li devas redakti tiujn mallongajn notojn pri la banalaj okazaĵoj, nomatajn "raportetoj." Sed kiu malhelpas lin redakti bele la raportetojn? Beleco ne signifas ornamon, sed harmonion kaj delikatan adaptiĝon de la afero al sia uzo. Raporteto povas esti tre bela, same kiel lada laboraĵo, gazeta banderolo kaj forkolekto de balaaĵoj, se oni plenumis tion kun zorgo kaj ĝojo pri la rezultato. Se tiu ĉi amiko redaktus la raportetojn kun ĝojo kaj zorgo pri perfektigo, li aliigus sian laboron iom post iom kaj li ĝin igus tre alta Via patro, filo, fieriĝas esti farinta tiel pri humila laboreto al li konfidita. Por komenci labori en verkado sur la ĵurnaloj, estis konfidata al li fako, kiu ĝis tiam estis rigardita kiel tute negrava. Ĝi celis nur amuzi la leganton de la ĵurnalo, distrante lin el la seriozaj aferoj, per la priskribo—sub la rubriko "Amuza fako," "De tie"

ĉi kaj tie,” “Scivolemo,” aŭ aliaj samspecaj—de la groteskaj strangajoj aktualaj, de la faro de stultulo kiu marŝis per la manoj, de la komikaj eksedziĝoj aŭ la sensencaj vetludoj en Usono. Via patro akceptis tiun modestan taskon kun ĝojo. Li klopodis baldaŭ alporti al la metio spiriton kaj amon. Li ne opiniis ĝin sennobla, sed plialtigebla, se nur volo kaj pacienco kuncelus al tio. Li ne hontis pri ĝi, sed male per ĝi li aspiris laŭdigi sin . . . Spirito kaj amo plenumis baldaŭ la deziratan miraklon. Sekrete, per neperceptebla ŝanĝo, la speco de l' laboro aliĝis. Hodiaŭ ĝi jam estas nereconebla, kiel la sama. Kiuj ne memoras ĝian senbrilan originon, tiuj supozas ĝin nova fako. Hodiaŭ, fileto, la laboro de via patro ĉe la ĵurnaloj estas opiniata de unuj bona, de aliaj malbona, sed de ĉiuj kiel verko de Filozofio, kiu estas la plej alta kaj malfacila el la intelektaj aktivecoj . . . Sed mi diras al vi ke ĉia metio iĝas Filozofio, iĝas Arto, Poezio, Elpenso, kiam la laboristo al ĝi donas sian vivon, ne permesante ke tiu ĉi dispartiĝu en du duonojn, unu por la idealo, alia por la ĉiutagaj bezonoj, sed farante el la ĉiutaga bezono kaj el la idealo unu saman aferon, afero kiu samtempe estu devo kaj libero, rutino rigora kaj inspiro renovigata.

Juvelo, fileto, ĝojo de via patro! Via patro havis kiel Patronon, en multaj momentoj de sia ekzisto, grandan homon, kiu devus esti tia al ĉiuj metiaj laboristoj, kaj kiun konas la historio per la nomo Bernard Palissy. Ian tagon mi donos al vi legi lian vivon, kiu estas rakontita de la franca verkisto Alphonse de Lamartine, kaj kiu estas verketo kiun mi donus legi al ĉiuj katalunaj infanoj. En ĝi vi vidos kiamaniere tiu metiisto alvenis ĝis la grandeco, kaj estis kio plej alta oni povas esti en la mondo; bonega artisto, lerta elpensinto, majstro en scienco, fama verkisto, homo societama, de societo kortega kaj tre alta, kaj homo religia, modelo kaj spegulo de konsciencoj, sen iama forlaso esti metiisto, kontraŭe kun ĉiam metiista sento, ĉar li faris belajn elpensojn kaj elpelis al admirinda perfekteco sian metion. Li ne ŝanĝis ĝin, escepte nur por transiri de metiisto de koloraj vitroj, kia li estis komence,

al metiisto de argilaj potoj, kiel li restis poste dum la tuta vivo. Sed, potfaristo, li altigis sin el laboraĵoj de fajenco al tiuj de porcelano; li retrovis la sekreton de l' majolikoj, pli delikataj kaj belaj, sekreto kiun estis posedintaj la ĥinoj kaj kiu pli poste estis perdita. Li laboradis super forno por baki siajn argilaĵon kaj tie, ĉiam serĉante, ĉiam esplorante, li eltrovis la plej bonajn trovaĵojn. Ĉar li ne havis alian deziregon ol siaj elpensaj, liaj najbaroj eĉ fine kredis lin komplete freneziga. Iun tagon, farante unu el siaj bakaĵoj, li bruligis la tegmenton de la domo. Li kaj liaj familianoj travivis longajn jarojn da mizero. Li fine triumfis: fabrikis la plej belajn argilaĵojn kiujn iam vidis homaj okuloj en Okcidento. Tiam estis kiam, elpensisto, li ankoraŭ iĝis artisto. Li donis vivon per siaj elpensitaj materialoj al mil perfektaj artaĵoj. Li dekoraciis ilin per la figuroj de diversaj animaletoj, de helikoj, de lacertoj, de koloraj fiŝoj, kiuj montris admirindajn rebrilojn. Por plenumi tiun ĉi laboron, jen por kio la artisto volis ankoraŭ fariĝi sciencisto, studante kun profito la naturon kaj la sciencojn de la naturo. Kaj poste li estis plue verkisto, ĉar li redaktis en plaĉa maniero la regulojn de sia arto, kaj projekton por beligo de ĝardenoj, kaj la rememorojn pri sia vivo. Kaj, en siaj lastaj jaroj, li enprofundiĝis en la Biblion, kaj ĉar estis epoko de religiaj malpacoj en Francujo, Bernard Palissy estis persekutata pro sia religia kredo, kaj oni enfermis lin en kastelo, kaj tiel pro sia kredo li estis malliberigata. Ĉar antaŭe li estis estinta dum kelka tempo kortegano kaj la reĝo estimis lin treege, oni rakontas ke tiu ĉi iris lin vidi en lia malliberejo, por proponi al li la liberecon ŝanĝe de malkonfeso, eĉ nur ŝajna, pri sia religio. La respondo de Palissy estis inda je lia perfekta konscienco de metiisto. Li rifuzis fiere. Ĉar li estis laborinta sian konsciencon kiel iun el siaj artoverkoj. Kaj ne estis pro la gajno ke li faris tiujn, sed nur pro amo al sia metio kaj al la rezultatoj de sia metio Filo, ekzistas modernaj barbaroj, kiuj elpensis por armilo de siaj bataloj, intence difekti, aŭ fari nekompleta aŭ volonte malsupera, la verkon kiun ili fabrikas per siaj propraj manoj. Tion ili nomas *sabotado*, kion katalune ni nomis

galoŝado, ĉar ĝi venas de homoj kiuj detruis per batoj de galoŝo la verkojn plej delikatajn kiujn la laboristoj estis farintaj. Tiuj homoj estis malbonuloj kaj la sabctado granda blasfemo; ĉar la homo neniam rajtas sur la verkon de li faratan; ĉar la verko estas supera al la homo; kaj la devo de la homo laboranta estas oferi sin al sia verko, kaj neniam oferi ĝin por aliaj celoj. La ekzemplo de Bernard Palissy donu al ni ĉiuj la esencan lecionon alporti amon kaj spiriton al la propra metio, kaj tiel havigi al ĝi la plej altan indon. Kaj al vi, filo mia, ĉar vi estas aŭskultinta min tute kviete, ĉar vi lasis ripozi en la miaj viajn manojn, kaj ĉar vi rigardis kun iom da miro, ne troe, eliri la vortojn el mia buŝo, hodiaŭ, tago de Sankta Luĉio, mi aĉetos al vi en la foiro kelkajn figuretojn. Inter ili estos anasinoj kaj porko, lignohakisto kun *barretina* kaj maljunulino sidante ŝpinanta. Ne rezultos la verkoj tiel perfektaj kiel tiuj de Bernard Palissy; sed eble ilia nekonata aŭtoro estos fervorulo enamiĝinta en la propran laboron, kaj, tial, homo pli belkondata ol nia amiko, la ĵurnalisto okulvitruilo, kaj ol nia amiko, la karikaturisto en brikkolora jako.

El la kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU CASAS

KIAL LA BESTOJ NE POVAS PAROLI

INDIANA LEGENDO

Antaŭ tre longe, tiel longe ke eĉ la libroj de la blankuloj nenion scias pri ĝi, la bestoj de la arbaro povis paroli kun la homoj. En tiu tempo la bestoj venis al la konsilfajroj kaj instruis al la indianoj la sciojn kiujn ili posedis pri la arbaroj kaj riveroj. La saĝa kastoro instruis al la indianaj virinoj kiel kapti la ezokon kaj salmon, kaj kiel konstrui domojn kiuj ŝirmos kontraŭ pluvoj kaj frostoj. La urso kaj la lupo kondukis la virojn sur la kampoj kaj tra la arbaroj kaj instruis ilin sekvi la postsignojn de ĉasaĵoj. La hundo, per pacienca ekzemplo, donis al la ruĝuloj la kapablon stari garde dum multaj tagoj sen laciĝo. De la procio la ruĝuloj lernis

suprengrimpi la plej altajn arbojn. La ĉevalo iris kun la indianoj sur la ebenaĵo kaj montris al ili kiel kuri rapide. La pantero montris kiel ili povas sin kaŝi en arbetoj, inter branĉoj de arbo aŭ malantaŭ roko, por kuregi sur la malamikojn kiel subita furiozo de ventego.

Tiamaniere de ĉiuj bestoj de la arbaro la ruĝuloj akiris lertecon en la artoj de arbaroj kaj kampoj, kaj kiam ili estas finintaj la lecionojn la vulpo kondukis ilin en la arbaron kaj instruis al ili la ruzecon kiun ili bezonas por utiligi siajn sciojn. Tiel ili vivis dum la veno kaj iro de multaj someroj kaj vintroj, kaj estis tre feliĉaj.

Sed fine la bestoj vidis, kun timo, ke la ruĝulo estas ilia mastro. Li posedis la saĝon de la kastoro, la flarpovon de la urso kaj lupoj, la paciencon kaj fidelecon de la hundo, la viglecon de la procio, la rapidecon kaj forton de la ĉevalo, la saltpovon de la pantero kaj la ruzecon de la vulpo. Pro tio, la bestoj havis konsiliĝon, sed la konsilfajro ne brulis en sia kutima loko, kaj la ruĝuloj dormis profunde dum paroladis iliaj fratoj de la arbaro.

La ĵaluza lupoj komencis la diskutadon, kaj deklaris, ke post zorga observado de ĉiuj flankoj de la afero li opinias, ke nur unu agmaniero estas konsilinda. Ili devas kuregi sur la vilaĝojn kaj mortigi ĉiujn indianojn, eĉ virinojn kaj infanojn.

La urso montris sin pli nobla, kaj diris, ke li opinias la proponon nejusta. Li deklaris tamen, ke la bestoj ne povas plu resti pacaĵo antaŭ la danĝeroj kiuj sin prezentas. Ili devas defii la indianojn kaj venki ilin en malkaŝa milito.

La kastoro argumentis, ke pli bone estos atendi ĝis venos la glaciaj ventoj de vintro, kaj tiam en la nokto disrompi la domojn kiujn la indianoj konstruis por ŝirmi sin mem kaj siajn infanojn kontraŭ la malvarmo. La ventoj kaj neĝoj de vintro, li diris, tre baldaŭ konvinkos tiujn friponojn ke ili devas submeti sin al la volo de la bestoj.

La pantero opiniis, ke la kastoro estas tro kompatema al la malamikoj. La indianoj estas timindaj, kaj se la bestoj deziras konservi sian liberecon kaj sendependecon ili devas sekvi la konsilon de la lupoj. Nur plena

elmortigo de la indianoj povos garantii la bestojn kontraŭ forpreno de iliaj rajtoj. Li konsilis tujan atakon sur la vilaĝojn, kaj volis ke oni montru kompaton al neniuj.

Ĉiuj aŭskultis atente kiam la procio stariĝis por paroli, ĉar li estis multe respektata de la loĝantoj en la arbaro. Li diris, ke li ne povas konsenti kun la pantero, ĉar la indianoj neniam faris al ili malbonon. Li tamen opinias, ke oni devas forpeli ilin, ĉar ili jam fariĝis tro lertaj pri la artoj de la arbaro. Tromulto da potenco en la manoj de individuo, diris la procio, estas danĝera al aliaj. Li subtenis la proponon de la kastoro. Ili devas zorge prepari siajn planojn, kaj devigi ke la indianoj konsentu al limigo de sia potenco.

La vulpo opiniis, ke estus plej bone ke ĉiuj bestoj metu sin sub lian instruadon. Li montros al ili, kiel ili povos trompi kaj ŝteli dum ili pretendas esti amikoj. Ili povos detrui la maizkampojn, kiuj provizas al la indianoj nutraĵon por la vintro. Ili povos demordi la ŝnurojn, kiuj tenas la kanotojn apud la riverbordoj, tiel ke ili fornaĝu kaj perdiĝu. Tiamaniere oni povos subfosi la potencon de la indianoj kaj devigi ilin submetiĝi laŭ la projekto proponita de la kastoro kaj subtenita de la procio. Tiu ĉi projekto, li daŭrigis, ne alportas danĝeron, kiel la batalo proponita de la pantero kaj la lupoj; kaj li opinias, ke zorga pripensado montros al ĉiuj ke ĝi estas la plej bona plano.

La hundo diris, ke li hontas ke li konsentis partopreni en konsiliĝo al kiu oni ne invitis la ruĝajn fratojn. Tio estas kontraŭ la kutimo kiu ekzistis de la tempo kiam la Granda Spirito unue sendis ilin en tiun ĉi riĉan kaj belan landon. Li timas ke la bestoj estas punotaj pro tiu ĉi perfideco, kaj ili estas ja indaj je punado. La indianoj ĉiam agadis kontraŭ ili amike kaj juste. Li ne povas konsenti al iu el la projektoj proponitaj, kaj se la aliaj bestoj decidus agi laŭ tiuj projektoj, li devos iri de la konsilfajro kaj averti siajn dormantajn fratojn pri la danĝero. Plue, se necese, li batalos por la ruĝuloj kaj helpos defendi iliajn vivojn kaj hejmojn kontraŭ la malamikoj.

Kiam la hundo ĉesis paroli, la lupoj kaj la pantero

forte koleris kontraŭ li. Ili akuzis lin pri malkuraĝo, malfido, subaĉetiĝo kaj perfideco. Ili diris, ke li fariĝis malsaĝa kaj malsagaca pro laŭdoj kaj karesoj kiujn faris al li la indianaj knabinoj. Ili minacis lin, ke se li iros al la vilaĝo por perfidi la decidojn de la konsiliĝo, ili disŝiros lin en pecojn. "Per malgranda kaj malbongusta peceto da maizpano," diris la pantero, "oni subaĉetis vin, kaj vi forlasas la rajtojn kiujn ĝis nun posedis ĉiuj hundoj. Oni opinius ke la memoro pri viaj prapatroj, kaj la ĉiuj noblaj hundoj kiuj vivis antaŭ ol vi venis en la mondon por senhorigi vian rason, incitus vin batali por la honoro de via nomo."

Tiuj varmegaj kaj koleraĵaj paroloj kreis konfuzon kaj eksciton, sed la hundo restis trankvila kaj dignoplena. Li tute ne montris ke li aŭdas la malĝentilajn kaj malverajn akuzojn de la pantero kaj la lupoj.

La ĉevalo tuj saltis en la parolokon antaŭ la fajro, kaj respondis energie kaj elokvente al la du mensogemaj akuzintoj. "Mi venas por defendi mian amikon la hundon," li diris. "Vi insultis kaj kalumniis lin laŭ maniero kiun ĉiuj honorindaj bestoj devas malaprobi kaj kondamni. Kvankam niaj gustoj estas malsimilaj kaj mi estas pli granda ol li, tamen li estas mia frato. Mi amas lin ĉar li estas ĝentila, aminda, fidela, nobla kaj brava. Vi, pantero, kaj vi, lupoj, fanfaronas pri via kuraĝo, sed kiu el vi kuraĝis kuri en la brulantan arbaron por elkonduki la blindan cervon? Kiu el vi kuraĝis salti en la riveron, profundan kaj danĝerplenan pro la degelantaj neĝoj kiam la vintro mortis kaj la varmaj ventoj funebris lin—kiam la akvoj bolis kaj saŭmis ĝis la suproj de la altaj bordoj kaj etendis sin sur la kampoj kiel vasta lago—kiu el tiu kolera rivero tiris senfortan kaj dronantan amikon? Ĝis nun mi amis vin ĉiujn, sed de nun mi ne akceptos plu la panteron kaj lupojn kiel fratojn. Ili opinias ke la braveco konsistas nur el feroca atako kaj kruela buĉado, sed mi deklaras al ili ke ĝi vere konsistas el noblaj agoj. Mi sekvos la hundon al la hejmoj de la ruĝuloj, kaj kune ni batalos kontraŭ viaj kruelaj intencoj."

Kiam la ĉevalo ĉesis paroli, la Granda Spirito subite aperis ĉe la konsilfajro, kaj diris, ke la eĥoj alportis al

liaj oreloj la laŭtajn voĉojn de la disputantoj, kaj ke li estas aŭskultinta kun malĝojo al ĉio kion ili diris. Pro tio li foriris el la Ĉaskampoj Feliĉaj kaj venis al ilia konsiliĝo. Li bedaŭras ke la feliĉaj interrilatoj ĝis tiam ekzistintaj inter la indianoj kaj la bestoj nun estas disrompitaj kaj nuligitaj. Kiam li donis al ili la vivon, li intencis ke fine ili ĉiuj kune vivu pace en la Ĉaskampoj Feliĉaj. Sed li devas ŝanĝi siajn planojn. Li aliigos la lingvon de siaj ruĝaj infanoj, por ke la bestoj ne povu plu paroli kun ili. Li iros al siaj infanoj en la vilaĝoj, kaj diros al ili ĉion kion oni diris ĉe tiu ĉi kaŝita konsiliĝo en la arbaro. De nun, la lupoj kaj la panteroj estos ĉasataj kaj mortigataj de la indianoj. Oni traktos ilin kiel plej danĝeraj malamikoj kaj konstante militos kontraŭ ili. La urson, tamen, oni rigardos kiel honorinda kontraŭulo, kaj la ruĝuloj malkaŝe batalos kontraŭ li kiam necese. La ruĝuloj ne serĉos lin por mortigi lin, sed kiam li venos kaj defios ilin al batalo ili ne rifuzos. La kastoro kaj procio, pro la malbonaj konsiloj kiujn ili donis, devos oferi siajn felojn por teni varmaj la infanojn de la indianoj. La vulpon oni rigardos kiel ŝtelisto. Li proponis ŝteli la nutraĵon de la indianoj kaj malriĉigi ilin; li povas agi laŭ sia deziro. Sed la indianoj estos avertitaj, kaj metos kaptilojn por li. Kiam ili kaptos lin, ili prenos lian felon kiel la felojn de la kastoro kaj procio. Oni permesos ke la hundo kaj ĉevalo komprenu la parolon de la indianoj; sed ĉar ili perfidis la antikvan kontrakton inter la indianoj kaj la bestoj, partoprenante en konsiliĝo al kiu oni ne invitis ĉiujn konsentintojn al la kontrakto, ili devas esti punotaj; kaj oni do ne permesos ke ili povu plu paroli al la indianoj. Sed ili ĉiam estos amikoj kaj helpantoj al la ruĝuloj; ili povos vivi en la hejmoj de la indianoj, ĉeesti la festenojn, havi parton de la akiraĵoj de ĉasado, esti amataj kaj karesataj de la knabinoj kaj infanoj; kaj partopreni en la bataloj de la indianoj, en iliaj ĝojoj kaj malĝojoj, sukcesoj kaj malvenkoj. Unuvorte, ili estos kamaradoj kaj amikoj de la indianoj eterne, en tiu ĉi mondo kaj en la Ĉaskampoj Feliĉaj . . .

El "The Legends of the Iroquois" de W. W. CANFIELD

HINDAJ MOROJ KAJ KUTIMOJ

DE E. O. LEGGATT

“Eliras homo por sia okupiĝo, por sia laboro ĝis la vespero.”

Tiuj ĉi vortoj de la hebrea psalmisto povus esti vere dirataj pri la ĉiutaga vivo de la Hindoj. Ili estas ja laborema popolo.

Iru kien ajn vi volas en hinda kamparo, kaj vi vidos la tutan mondon laboranta de sunleviĝo ĝis sunsubiro, krom nur tiam, kiam konstanta pluvo nebligas kamp-laboron. Laŭ sezono, oni sekvas kaj gvidas la praforman plugilon, tiratan de bovoj aŭ bubaloj; oni semas aŭ rikoltas, aŭ ĉerpas akvon el malprofundaj putoj per ledaj siteloj, por irigacii tra etaj ŝaneloj la soifajn kampojn; oni pelas al la paŝtejoj arojn da bovoj aŭ kaproj, aŭ veturigas ŝargitajn bovoĉarojn tra la sablaj vojoj. Ĉie movado, kvankam ne tre rapida; ĉie krioj kaj bruo.

Aŭ venu promeni kun mi en iu urbo, tra ĝiaj malvastaj stratoj kaj bazaroj. Ambaŭflanke de la vojo staras budoj kaj butiketoj, kie sur estrado sidas kun krucigitaj kruroj la butikistoj kaj metiistoj, vendantaj siajn komercaĵojn aŭ laborantaj super siaj materialoj. Ofte unu metio okupas tutan kvartalon, kaj en kelkaj el ili, ekz., en kuprista kvartalo, la bruo de la martelado estas vere surdiga.

La bazaroj svarmas per promenantoj kaj aĉetantoj. Jen virinoj, kiuj aĉetas por la hejmo legomojn kaj grenon. Tiuj aliaj serĉas bonaĉeton en drapoj aŭ ŝtofoj. La butikoj kun muŝokovritaj sukeraĵoj altiras ne nur la infanojn, sed ankaŭ plenaĝulojn. Odroj de spicoj kaj fruktoj, de ajlo kaj klarigita butero, plenigas la aeron.

Rigardu tiun viron kriegantan kaj gestantan interparolade kun vendisto. Li ne vere koleriĝas. Li nur marĉandas pri latuna ujo, kiun li deziras aĉeti kiel eble plej malkare.

Tiuj ĉi humil-aspektuloj, marŝantaj paciencie, kun klinitaj kapoj, estas malalt-kastanoj. Tiu fermiena, belaspekta viro, kun kapo razita, kaj portanta la sanktan fadenon sur la maldekstra ŝultro, estas Bramana pastro. Li, same kiel ĉiuj Bramanoj, rigardas sin, kaj estas

de ĉiuj Hinduoj rigardata, kiel dieco enkarnigita.

Tiu altstatura, parade marŝanta persono, kiu portas grandajn ŝuojn, kun pintoj refalditaj, vastegan pantalonon kaj altan turbanon, estas sendube Afgano, aŭ iu tribano el nord-okcidenta limo, kiu venis suden por vendi ĉevalojn arabajn, aŭ eble tapiŝojn el Persujo aŭ Baluĉistano.

Inter la marŝantoj kuras ĉaretoj, nomataj *ekka*, speco de malpeza du-rada fiakro, tirata de ĉevaleto. Kelkfoje bovoĉaro kun du trotantaj bovoj portas iun *zamindaron*, t.e., bien-havanto, de lia kampara hejmo tra la urbo por fari viziton aŭ negocon. Jen kvar viroj amble portas fermitan palankenon, kiu entenas virinon nevideblan. Jen, tra la amaso, du kuristoj kriadante trabatas vojon por impona veturilo, kun paro da belaj ĉevaloj. En ĝi sidas iu princo aŭ riĉulo.

El ĉi tiuj pitoreskaj amasoj da homoj, sidantaj, laborantaj, marĉandantaj, marŝantaj, veturigantaj, la noveveninto ricevos impreson tre konfuzigan. La kafe-brunaj vizaĝoj kaj strangaj vestoj, la koloroj kaj aromoj, la varmego, polvo kaj bruo, estas la vera Oriento de ekstera vidpunkto. Sed kiaj estas la pensoj kaj ideoj de tiuj amasoj; kiamaniere ili vivas; kiaj estas iliaj kredoj kaj kutimoj; pri tiuj demandoj, nur grade kaj post multjara vivado inter ili oni atingas ioman scion.

Kompreneble la ĉefa ilo per konatiĝi kun ili estas scio de ilia lingvo, aŭ pli vere de unu el iliaj lingvoj, ĉar en Hindujo estas parolataj kelkcentoj da lingvoj kaj dialektoj, el kiuj la plej disvastigitaj estas *Hindi* kaj ĝia ido *Hindustani* aŭ *Urdu*.

Post la lingvo, la ĉefa afero estas la religio. De ĝenerala vidpunkto la moroj kaj kutimoj de iu popolo estas reflektajo de ĝia interna vivo, de ĝiaj plej intimaj konceptoj kaj kredoj, unuvorte de ĝia religio.

La du ĉefaj religioj de la Hinduoj, laŭ nombro, estas Hinduismo kaj Mahometanismo. Sed la Hinduoj estas multe pli nombraj ol la sekvantoj de Islamo. En tuta Hindujo, kun Birmo kaj Cejlono, la Hinduoj estas nombre 217,000,000 kontraŭ 69,000,000 da Mahometanoj.

Mahometanismo aŭ Islamo, la religio fondita de la araba profeto, Mahometo, en la sepa jarcento post Kristo,

estis la religio de diversaj rasoj el Mez-Azio, kiuj invadis Hinduojn de tempo al tempo dum sep jarcentoj, de la 11a ĝis la 18a jarcento post Kristo. En tiu periodo ili batalis kontraŭ la hinduaj enloĝantoj, venkis ilin, perforte konvertigis multajn, kaj fondis en la 16a jarcento grandan imperion, kies estro, loĝanta en Delhi, estis nomata la Granda Mogolo.

La Mahometanoj havas tre simplan, klare difinitan kredon: *Nenia dio estas krom Dio, kaj Mahometo estas la apostolo de Dio.* El la minaretoj de sennombraj moskeoj la *muazzin* elsendas tiun krion kvinfoje ĉiutage. Allah, la Dio de Mahometanismo, estas unupersona, aŭtokrata Dio. Ĉio, kio okazas, estas dekretita de Dio. La Korano, diktita al la profeto, estas la vera laŭlitera vorto de Dio. La devoj de Mahometanoj estas: (1) konfesi la kredon, (2) preĝi laŭ difinita metodo post ceremonia lavado, (3) doni almozon, (4) fasti de sunleviĝo ĝis sunsubiro dum unu monato en la jaro, (5) fari pilgrimon al Mekka. Mahometanoj estas tre zorgaj pri ĉi tiuj devoj, kvankam ĉiuj ne povas fari la pilgrimon. Rilate la faston, kiam ĝi okazos en la varma sezono, la sufero estas tre granda. Ili preĝas tre regule; kaj ofte je sunsubiro oni vidas Mahometanon preĝanta en kiu ajn loko li trovas sin, kaj faranta la difinitajn surventriĝojn, k.t.p. Iufoje en la granda moskeo de Delhi mi vidis kelkmilojn de viroj (la virinoj ne preĝas en la moskeoj) starantaj laŭ longaj vicoj, kune kliniĝantaj, kune genuiĝantaj, kune restariĝantaj,—tre frapa kaj impona vidaĵo.

La Mahometano estas iom pli libera ol la Hinduo, ĉar teorie li ne estas regata de la kast-sistemo. Tial, ekzemple, iu Mahometano povas manĝi kun iu alia, kaj ĉiuj Mahometanoj estas teorie egalaj. Tamen praktike tiuj hinduaj kasto, kiuj amase konvertiĝis antaŭatempe al Islamo, kunportis kun si la kastajn regulojn. Ili edziĝas kaj heredas laŭ la reguloj de sia kasto, kaj eĉ kunigas la adoron de Allah kun kulto de iu hindua dio aŭ dieto.

Kontraŭe, Hinduoj kelkfoje partoprenas en religiaj procesioj de Mahometanoj je *Muharram*, kiam oni solenas la morton de Husen, nepo de la profeto.

Hinduismo evoluigis el miksiĝo de primitivaj superstiĉoj kaj kultoj de lokaj aŭ tribaj dioj kaj spiritoj, adorataj de la pra-loĝantoj en Hindujo, kun la religio de grandaj natur-dioj, kiun la Arjoj kunportis, kiam 1500 jarojn antaŭ Kristo ili eliris el Mez-Azio, kaj invadis la nordajn ebenaĵojn de Hindujo. Iom post iom ili antaŭenpuŝis sian influon ĝis la plej sudaj regionoj de la hinda kontinento.

Hinduismo prezentas tre notindan kontraston al Islamo. Filozofie ĝi estas plejparte panteista. Praktike kaj ĉe la popolamaso, ĝi estas politeista, konfesanta sennombrajn diojn, kaj permesanta ĉiuspecajn kultojn.

Estas tre malfacile difini kiu estas Hinduo. Sed ĉiuj konsentas, ke Hinduo devas esti la ido de hinduaj gepatroj. Neniu kiu ne naskiĝis Hinduo, povas fariĝi Hinduo. Hinduo povas teni kiajn ajn kredojn li volas, kondiĉe ke li obeas al la kast-reguloj, kaj respektigas Bramanojn kaj bovinojn.

Preskaŭ ĉiuj Hinduoj tenas la doktrinojn de *Reenkarniĝoj* kaj *Karma*. Preskaŭ ĉiuj Hinduoj konfesas multajn diojn sur bazo panteisma, kun tendenco allasi, tre malprecize, ke ekzistas unu superreganta Dio nomata *Iŝvar* aŭ *Bhagwan*.

En la hindua panteono super ĉiuj ceteraj dioj staras la tri grandaj dioj, Brahma, Ŝiva, Viŝnu. El tiuj ĉi, Brahma, la kreinto, estas preskaŭ neniam adorata; en tuta Hindujo ekzistas nur unu-du temploj de tiu dio. Kontraŭe, Viŝnu, precipe en siaj enkarniĝoj Kriŝna kaj Rama, havas multajn milionojn da adorantoj: kaj Ŝiva kun sia edzino Kali (terura sangsoifanta diino) estas egale vaste adorata.

Oni rekonas la apartajn adorantojn de Viŝnu per trident-forma vertikala signo, pentrita sur la frunto, dum la sekvantoj de Ŝiva portas sur la frunto tri horizontalajn liniojn, unu super alia.

La Hinduoj ne havas ion similan al la komuna preĝo de Kristanoj aŭ Mahometanoj. Ĉiu homo faras sian individuan adoron. Li ne diras preĝon. Se li ion deziras, li nur vizitas templon kaj prezentas sian oferon antaŭ la idolo, elparolas la nomon de la dio, kaj ĉirkaŭ-

marŝas du-tri fojojn la sanktejon. Al kelkaj dioj oni buĉoferas bestojn aŭ birdojn.

En Hinduismo estis ankaŭ elemento de hom-ofero. Kompreneble tion malpermesas la leĝaro, sed de tempo al tempo ĝi okazas. Mi memoras ke en mia juĝejo du personoj, virino kaj fakiro, estis akuzataj pri tiu krimo. Konstatigis ke la virino, estante seninfana, konsultis fakiron, t.e., sanktulo laŭ profesio. Li konsilis ke, se ŝi buĉoferos infanon kaj baniĝos en ĝia sango, ŝi nepre naskos infanon. Laŭe, ili forprenis najbaran infanon kaj mortigis ĝin en la domo de la virino.

La vivo de Hinduo, de ekstera vidpunkto, estas tre simpla. La ordinara mezranga Hinduo loĝas en malgranda domo el koto, de unu aŭ du etaĝoj, kun malmultaj ĉambroj ĉirkaŭ korteto. En la ĉambroj vidiĝas unu-du matoj, kelke da potoj kaj patoj, kaj taburetoj; du-tri malaltaj lignaj lit-kadroj, kaj stebitaj litkovriloj; preskaŭ neniam plu.

Sed la interna socia vivo de Hinduo estas afero multe pli komplikita. La hindua societo estas disdividita laŭ multaj hermetike ŝtopitaj fakoj nomataj kasto, kaj en la hindua vivo, mi supozas, la kasto havas la plej potencon kaj ĉion-ampleksan influon.

Kasto tenas la Hinduon per fera tenego, ĉiujn liajn tagojn. Li neniam povas ŝanĝi sian kaston. En kiu kasto li naskiĝis, en tiu li restos ĝis morto, kaj eĉ preter la morto. Li neniam povas grimpi al supera grado. Li devas manĝi kaj trinki laŭ la kast-reguloj. Kun unu escepto, li devas ne manĝi manĝaĵon tuŝitan de alikastano, kaj nur el la mano de kelkaj kasto li povas ricevi trinkon. El la mano de Bramano, tamen, ĉiuj kasto volonte manĝas kaj trinkas. En malliberejoj, la manĝaĵoj por ĉiuj personoj estas preparataj de bramanaj kuiristoj; kaj riĉa komercisto aŭ princo ofte havas kuiriston bramanan. Kontraŭe, se malalkastano nur lasas fali sian ombron sur la manĝaĵon de altkastano, tiu ĉi ne povas manĝi, sed devas pretigi pluan.

Unuflanke, kasto tre forte unuigas ĉiujn samkastanojn, sed aliflanke ĝi starigas netransasireblajn barojn inter la diversaj kasto. Kompreneble ekzistas inter diversaj

kastoj interrilatoj de parolado kaj komercado. Oni eĉ povas havi amikecon kun alikastano; sed la unua ne povas transpasi la limojn de interna familia vivo de la alia; ne povas manĝi kun li, kaj ne povas interrilatiĝi kun li per edziĝo.

La kasto ordinare respondas al la okupo aŭ metio. Ekzemple, estas kastoj de komercistoj, oraĵistoj, feraĵistoj, ledaĵistoj, k.t.p.; kaj eĉ kastoj de profesiaj ŝtelistoj. La ĉefa kasto estas tiu de la Bramanoj, en kiuj loĝas la dieco enkarnigita. Ilia kasta profesio estas la pastreco, kvankam la plimulto el ili okupas sin pri aliaj profesioj, kaj estas trovataj inter oficialuloj, instruistoj, farmistoj, soldatoj, k.t.p. La dua kasto, laŭ rango, estas tiu de Raĝputoj, kiuj laŭ kasta profesio estas soldatoj kaj regantoj, kvankam kiel la Bramanoj, multaj el ili sekvas aliajn okupojn, kiel farmistoj k.t.p.

Sub ĉi tiuj du superaj kastoj troviĝas kastoj de komercistoj, oraĵistoj, terkulturistoj, kaj aliaj diversaj metiistoj. Ankoraŭ pli malsupre ni havas tiujn, kiuj okupas sin pri malpuraj materialoj, kiel ekz. la *ĉamaroj* (ledaĵistoj), aŭ faras malestimatajn servojn, kiel purigistoj, lavistoj, k.t.p.

Proksimume, oni povas diri ke la diferenco inter la Bramanoj kaj Raĝputoj kaj la malsuperaj kastoj estas diferenco de raso. La unuaj plejparte devenis de la Arĵaj invadintoj, dum la aliaj estas devenuloj de la indiĝenoj kiujn la Arĵoj trovis en la lando. La plej malsuperaj, plej malestimataj kastoj eble estas devenintaj de ankoraŭ pli antaŭa raso, kaj kvankam nominale Hinduoj ili ne estas veraj Hinduoj, ĉar ili manĝas bovaĵon kaj "malpurajn" manĝaĵojn, kaj havas siajn proprajn pastrojn. Ili ne estas permesataj eniri la hinduajn templojn, nek ĉerpi akvon el la vilaĝa puto.

Post la reguloj pri manĝado, la plej grava afero regulata de kasto estas edziĝo. Oni ne povas edziĝi ekster la kasto. La kastoj mem estas ofte disdividitaj laŭ multe da subkastoj; kelkfoje ne estas permesate edziĝi ekster la subkasto, aŭ kontraŭe, oni devas edziĝi en alia subkasto.

Infana edziĝo estas deviga. Hinduo tre hontus, ne

edziniginte sian filinon antaŭ la aĝo de 10 aŭ 12 jaroj. Knaboj edziĝas laŭ sama aĝo. Kompreneble la edziĝa paro, pro juneco, ne povas fari elekton; ĉio estas aranĝata de la gepatroj. Unue, oni sciiĝas ĉu la horoskopoj de la geknaboj estas kunakordaj, kaj se tiun kaj aliajn aferojn oni trovas taŭgaj, oni difinas bonaŭguran tagon por la edziĝo. Je la difinita tago la fianĉo alvenas surĉevale, aŭ en palankeno, al la hejmo de la fianĉino. La edziĝaj ceremoniaj estas solenataj kun kiel eble la plej parada kaj malŝparema festado; la patro de la fianĉino festenigas Bramanojn kaj aliajn, montrigas piroteknikaĵojn, k.t.p. La fianĉino devas alporti al sia edzo kiel eble plej grandan doton. Tio ĉi, kun la kosto de la edziĝa festado, estas tre peza ŝarĝo. Mi konis serviston ricevantan salajron po 5 rupioj ĉiunonate, kiu elspezis 200 rupiojn por edzinigi sian filinon.

Tiakiale, multaj personoj estas dum la tuta vivo en manoj de monpruntistoj; kaj oni povas kompreni, ke filinoj ne estas ofte bonvenaj.

Pro tiu kaj aliaj kaŭzoj estis kutime ĉe kelkaj kasto mortigi knabinojn novenaskitajn.

Post edziniĝo, la knabino restas ankoraŭ unu-du jarojn ĉe siaj gepatroj. Post tiu periodo, la edzo alkondukas ŝin ceremonie al la propra hejmo.

Ĉi tie ni tuŝas la pozicion de la virino en hindua vivo. Ĉe la superaj kasto ŝi havas multe malpli da libereco ol en la kasto malsuperaj. Ĉe tiuj ĉi lastaj, la virinoj estas permesataj reedziniĝi post la morto de la edzo, kaj povas iri libere en bazarojn kaj aliajn publikajn lokojn. Sed en la pli altaj kasto, vidvinoj, kiel ajn junaj, ne povas reedziniĝi. Oni konsideras ilin malbenitaj pro iu grava peko en antaŭa enkarniĝo. Ili devas razi la kapon kaj vivi tre askete; ne partoprenas en festoj; kaj devas senĉese labori en la hejmo dum la tuta vivo. Aldone al tio, la virinoj altkastaj devas ne montri sin publike, sed plejparte restas apartigitaj (same kiel la Mahometaninoj) en la virinejo.

Funde, la Hindoj estas tre religia kaj spiritema popolo. Inter ili jam estis longa serio de viroj, kiuj pasigis sian

tutan vivon serçante Dion kaj esplorante la realecon kiu substaras la aperaĵojn de la universo. Ili ellaboris filozofiojn grandiozajn kaj tre subtilajn—plejparte kun bazo panteista. Sed la amaso perdiĝis en ĵangalo de diversaj kultoj kaj superstiĉoj. Ilia vivo estas sieĝata de ĉiaj specoj de timo kaj teruro pri malbonvolaj dioj, malbonaj spiritoj kaj demonoj, kiuj, ne pacigite, vizitigos al ili ruinon, malsanon kaj morton. Laŭ ilia panteista filozofio la dieco montriĝas egale en la bono kaj la malbono; kaj la diversaj dioj, de ili adorataj, estas pekoplenaj, kruelaj, venĝemaj kaj voluptemaj.

En la nuna artikolo mi celis prezenti al la legantoj kelkajn aspektojn de la socio kaj religio hindaj. Inter la hindoj kaj ni okcidentuloj estas grandaj kaj gravaj diferencoj en vivmaniero kaj karaktero, kaj dum ni, ekzemple, precipe altestimas justecon, veremon, rektan konduton, kaj kuraĝon, ili pli emfazigas la devojn de rezignacio, pacienco, humileco, cedemo al la sorto, kaj absoluta abnegacio. Kiu decidus inter la du idealoj?

Oni devas konsenti, ke por tiu, kiu bone konas la hindojn, ili estas amema kaj aminda popolo.

LA MORTIGO DE DOWNIE

En la dek-oka jarcento la pordisto de la Marischal Kolegio en Aberdeen estis viro nomita Downie (*elp.* Daŭni). Unu el liaj devoj estis rigli la ĉefan pordon de la kolegio precize antaŭ la horo de la matena diservo. Tiel akurate li plenumis sian devon, ke tre ofte studentoj, kiuj malfruis, devis stari ekstere atende ĝis la finiĝo de la preĝoj, kaj post sia eniro ricevi akrajn riproĉojn kaj eĉ monpunojn de la Kolegiestro kaj profesoroj pro sia malfrueco.

Ĉi tiu severeco tiel ofendis la studentojn, ke ili per ĉiaj rimedoj provis turmenti la pordiston. Li, siaflanke, agis kontraŭ la studentoj tiamaniere, ke preskaŭ ĉiutage okazis konfliktoj inter li kaj ili. Downie atentis, ke ĉiuj liaj faroj estu ĝuste laŭleĝaj; sed liaj kontraŭuloj ne

estis tiel zorgemaj, kaj la decidoj de la Kolegiestro estis ĉiam malfavoraj al ili kaj favoraj al Downie. Ĉar riproĉoj kaj monpunoj ne efikis por pacigi la studentojn, dumtempa ekzilo kaj okaze la ekstrema puno de forpelo fariĝis necesaj. Fine la leĝo kaj la ordo venkis. Sed daŭris sekreta kaj mortiga malamikeco kontraŭ Downie, kaj aŭdiĝis diversaj projektoj por venĝo.

Dum la mallonga novjara ferio, Downie kaj la instruistoj kaj instruistoj ĝuis ripozon. Unu vesperon, dum li sidis kun la familio en sia oficiala domo ĉe la enirejo de la kolegio, estis frapo ĉe la pordo. Downie leviĝis por malfermi la pordon, kaj tie staris sendito, kiu informis lin, ke sinjoro en apuda hotelo volas paroli kun li. Downie tuj obeis la alvokon, kaj, alveninte en la hotelo, li estis kondukata tra kelkaj ĉambroj ĝis li sin trovis en granda salono, nigre drapirita kaj lumigita per unu sola kandelo. Li devis atendi iom da tempo, kaj jen prezentis sin kvindek figuroj nigre vestitaj kaj maskitaj. Ili aranĝis sin en formo de juĝa kortumo, kaj Downie, pala de teruro, sciigis, ke li estas juĝota pri supozita krimo. Juĝisto sidis sur ĉefseĝo; publika prokuroro kaj asesoro sidis antaŭ ĵurintaro: ĉeestis ankaŭ atestantoj kaj rigardantoj. Downie unue pensis, ke la tuta afero estas ŝerco; sed la proceduro estis kondukata tiel solene, ke li fine ekkredis ke la terura tribunalo estas serioza. La asesoro laŭtleĝis la akuzon, laŭ kiu oni plendis, ke Downie komplotis kontraŭ la libereco de la studentoj; atestantoj donis ateston; la publika prokuroro alparolis la ĵurintaron; kaj la juĝisto klarigis la leĝon.

“Sinjoroj,” ekdiris Downie, “ĉi tiu ŝerco jam sufiĉe daŭris. Estas malfrue, kaj mia edzino kaj familio malkvietiĝos pri mi. Se ĝis nun mi estis tro severa kontraŭ vi, mi ĝin bedaŭras. Mi certigas al vi, ke estonte mi kondutos pli zorgeme.”

“Sinjoroj en la ĵurintaro,” solene diris la juĝisto, ne atentante la alpeton, “konsideru vian verdikton; kaj se vi deziras retiri vin por privata pripensado, tion faru.”

La ĵurintaro sin retiris. Durn ĝia foresto la plej profunda silento regis; kaj ne estis ia moviĝo, krom kiam oni renovigis la solan kandelon, kiu lumis apud la

juĝisto.

La ĵurintaro revenis, kaj anoncis la verdikton :
 “Kulpa.”

La juĝisto solene alprenis grandan nigran ĉapon, kaj metinte ĝin sur la kapon, alparolis la kulpigiton.

“Rikardo Downie, la ĵurintaro unuvoĉe kondamnis vin pri konspirado kontraŭ la libereco kaj rajtoj de la studentoj de Marischal Kolegio. Vi senbezone incitis kaj insultis tiujn neofendemajn personojn dum kelkaj monatoj, kaj certe via puno estos severa. Preparu vin por la morto ! Post dek kvin minutoj la verdikto de la tribunalo estos plenumita.”

La juĝisto metis sian poŝhorloĝon sur la katedro. Blokon, hakilon, kaj sakon da segaĵoj oni enportis en la centron de la ĉambro. Figuro pli teruriga ol iu jam aperinta eniris kaj pretiĝis agi kiel ekzekutisto.

Estis jam noktomezo. Nenia sono aŭdiĝis, krom la tiktako de la poŝhorloĝo de la juĝisto. Downie pli kaj pli teruriĝis.

“Sinjoroj,” ekkriis la timigita viro, “lasu min iri hejmen. Mi promesas, ke vi ne plu havos kaŭzon por plendi.”

“Rikardo Downie,” diris la juĝisto, “vi vane forperdas la malmultajn momentojn, kiuj restas al vi sur ĉi tiu tero. Vi estas en la manoj de tiuj, kiuj devas havi vian vivon. Nenia homa potenco povas savi vin. Eldiru unu krion; kaj oni kaptos vin kaj via sorto estos decidita antaŭ ol vi povos eldiri alian. Ĉiu ĉeestanto ĵuris solene, ke li ne malkaŝos al iu la nunajn farojn. Nur ni, kaj ni solaj, scias pri la afero. Kiam la celo, por kiu ni kunvenis, estos efektivigita, ni disiĝos. Pretiĝu, do, por la morto ! Oni lasas al vi ankoraŭ kvin minutojn.”

La kompatinda viro, en agonio de morta teruro, ekkriegis, kaj petegis kompaton, sed la venĝantoj ne atentis liajn kriojn. Liaj febraj, tremantaj lipoj moviĝis kvazaŭ por silenta preĝo, ĉar li sentis, ke la mallonga tempospaco inter li kaj la eterneco estas kvazaŭ kelke da tiktakoj de la poŝhorloĝo.

“Nun !” ekkriis la juĝisto.

Kvar personoj alpaŝis, kaj ekkaptis Downie, sur kies

vizaĝo ŝvitgutoj jam aperis. Ili nudigis lian nukon, kaj genuigis lin antaŭ la bloko.

“Frapu!” ekkriis la juĝisto.

La ekzekutisto frapis per la hakilo—sed, *sur la plankon*, —kaj helpanto ĉe la kontraŭa flanko samtempe frapis la nukon de la kulpigito per malvarma, malseka tolaĵo.

Laŭta ridado anoncis, ke la ŝerco finiĝis. Sed Downie ne respondis al la brua ridado. Ree oni ridegis, sed ankoraŭ li ne moviĝis. Oni levis lin, sed Downie kuŝis—*mortinta!* Teruro mortigis lin, tiel trafe kiel senkapiĝo per hakilo de efektiva ekzekutisto.

Al ĉiu ĝi estis tragedio. La medicinaj studentoj provis sangellason, sed vane. La konspirantoj devis nun pensi pri sia propra sendanĝereco. Ili ĵuris silenti inter si, kaj la timigitaj junuloj, ankoraŭ maskitaj, lasis la korpon de Downie en la hotelo. Unu el ili diris al la hotelestro, ke ilia festo ankoraŭ ne estas finita, kaj ke ili ne deziras, ke oni ĝenu la homon en la ĉambro dum kelkaj horoj. Tio estis por lasi, ke ili forkuru.

Proksiman matenon oni trovis la korpon. Oficiala enketo okazis, sed oni ne povis decidi ion. La korpo de la kompatinda Downie ne montris ian markon de perforto internan aŭ eksteran. La kontraŭagado inter li kaj la studentoj estis bone konata. Oni ankaŭ sciis, ke la studentoj luis ĉambrojn en la hotelo por teatra prezentado, kaj ke Downie estis alvokita de ili; sed krom tio oni ne sciis ion. Oni ne aŭdis bruon, kaj nenia pruvo de mortigo estis havebla. Kiu, el ducent studentoj, povus elmontri la suspektitajn kvindek? Plue, la studentoj loĝis en diversaj partoj de la urbo, kaj inter ili estis filoj de magistratanoj, kaj pro tio ne estis dezirinde esplori la aferon tro zorge.

La vidvino kaj infanoj de Downie estis prizorgataj,—sed la maniero de la mortigo restis mistero, ĝis dek kvin jarojn poste, kiam sinjoro mortonta rakontis la tutan historion, kaj konfesis, ke li estis unu el la studentoj, kiuj partoprenis en la mortigo de Downie.

El la angla lingvo tradukis kaj adaptis

W. M. PAGE

LITERATURA FAKO

Dum la kvin jaroj de la ĝisnuna vivo de *Literaturo* sub la aŭspicioj de la Brita Literatura kaj Debata Societo, la literaturo de Esperanto konstante kreskis. Kune kun multaj bagatelaj kaj eble nenecesaj verkoj, aperis ankaŭ, en diversaj landoj, sufiĉa nombro da libroj kiuj havas, de unu vidpunkto aŭ alia, multe da intereso por la serioza studanto de nia lingvo kaj movado. Ne estas eble doni ĉi tie liston de tiuj verkoj, kaj ne estus dezirinde fari distingojn inter ili rilate al esenca merito aŭ ŝajna daŭremo; sed mi povas mencii, inter la verkoj kiuj al mi ŝajnas atentindaj, la jenajn, kiujn mi kore rekomendas por legado:—*Sonĝo de Someromeza Nokto* (aperinta unue en la paĝoj de ĉi tiu gazeto), *Pro Kio? Stranga Heredaĵo, Natan la Saĝulo, Idoj de Orfeo, Sinjoro Tadeo, Fabeloj de Andersen, Joseph Rhodes kaj la Fruaj Tagoj de Esperanto en Anglujo*. Mi deziras nun diri kelkajn vortojn pri la du lastenomitaj kaj ilia speciala intereso.

La apero de la *Fabeloj* estas tre malofta kaj preskaŭ ne reatendota afero, ĉar ĉi tie ni havas novan verkon de la Majstro mem. Kelkaj el la fabeloj (kiel *La Novaj Vestoj de la Reĝo*) jam estas familiaraj al legantoj de la *Fundamenta Krestomatio*, sed certe la rakontoj plejparte ne estas konataj en la Esperanta formo al legantoj de ĉi tiu gazeto. Kiu deziras havi novan kolekton de Zamenhofaj verketoj, faros bone havigante al si la libron, el kiu mi citas la jenajn paragrafojn por montri la simplan kaj instruan stilon:—

Estis iam fasko da alumetoj, kiuj estis tre fieraj pri sia alta deveno. Ilia prapatro, t.e. la granda pino, el kiu ĉiu el ili estis tre malgranda peceto, estis granda, alta arbo en arbaro. La alumetoj kuŝis sur kornico inter fajrofarilo kaj malnova fera poto, kaj al ĉi tiuj ili rakontis pri sia juneco. “Jes, kiam ni estis sur la verda branĉo,” ili diris, “tiam ni efektive havis bonan vivon. Ĉiun vesperon kaj matenon ni havis diamantan teon, tio estis la roso; la tutan tagon ni havis sunbrilon, t.e. kiam la suno

brilis, kaj ĉiuj malgrandaj birdoj devis rakontadi al ni historiojn. Ni povis tre bone rimarki, ke ni estas ankaŭ riĉaj, ĉar la arboj folihavaj estis vestitaj nur en somero, sed nia familio havis sufiĉe da rimedoj, por havigi al si verdajn vestojn ne sole por somero, sed ankaŭ por vintro. Sed jen venis arbohakistoj, kaj tiam fariĝis granda revolucio; nia tuta familio dispartiĝis. La patro de la familio ricevis oficon de ĉefa masto sur belega ŝipo, kiu povis ĉirkaŭveturi la tutan mondon, kiam ĝi volis. La aliaj branĉoj ricevis aliajn oficojn, kaj ni havas nun la taskon bruligi lumon por la malalta popolamaso.”

“Mi povas kanti alian kanton,” diris la fera poto, ĉe kies flanko kuŝis la alumetoj. “De la momento, kiam mi ekvidis la lumon de la mondo, oni min multe da fojoj frotlavis kaj boligis. Mi zorgas pri la aferoj solidaj, kaj en efektiveco mi estas ĉi tie la unua en la domo. Mia sola plezuro estas post la tagmanĝo kuŝi pura kaj bonorda sur la kornico kaj prudente babili kun la kamaradoj. Sed esceptinte la sitelon, kiu de tempo al tempo iras malsupren sur la korton, ni ĉiuj vivas ĉi tie ĉiam pordofermite. Nia sola kuriero de novaĵoj estas la bazara korbo, sed ĉi tiu parolas tro ribeleme pri la registaro kaj la popolo. Antaŭ nelonge unu malnova poto kaŭze de tio pro teruro eĉ falis sur la plankon kaj rompiĝis en pecojn. Ĉi tiu estis politike bonintenca, mi povas certigi al vi.”

Eble oni diros, ke la Majstro tradukis tre simplan rakonton! Sed necesas pli ol tio por uzi nian lingvon tiel klare kaj rekte. Oni legu la Majstron kelkfoje, eĉ se nur por havi kontraŭilon al la ofta tendenco, verki en tiel-nomita “internacia” stilo per konstanta turnado kaj tordado de vortoj kaj esprimoj. Tio, kio taŭgis por la kreinto de nia lingvo, ankaŭ taŭgu por liaj disĉiploj!

La verko pri Joseph Rhodes, unue farita en la angla lingvo de John Merchant, Prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, kaj tradukita en Esperanton de Louise Briggs, estas tute malsimila libro. Ĝia intereso kuŝas

parte en la portreto kiun ĝi prezentas de la konata angla pioniro, kaj parte en la informo kiun ĝi donas pri (laŭ la titolo) la fruaj tagoj de Esperanto en Anglujo. Tiu informo ĉiam restos historie grava kaj interesa, kaj estas bone ke ĝi estas kvazaŭ registrita per ĉi tiu verko kaj nun ne perdiĝos. Multaj novaj Esperantistoj nenion scias pri la detaloj de la movado en Anglujo antaŭ la milito de 1914-18, kaj des malpli pri ĝia historio en, ekzemple, 1902-1910. Sed la libro ankaŭ donas al ni impreson pri la pioniro mem ; viro modesta, senfama en mondaj aferoj, sindona, kaj afabla ; kaj mi finos mian artikolon citante la jenan diraĵon pri li, kontribuita de alia pli vaste konata samideano kiu mem forpasis el la mondo baldaŭ post la apero de la verko :—

Esperanto estis ja bonŝanca, trovante tian pioniron en tiu ĉi lando ; kaj ju pli longe mi konis lin, des pli mi ŝatis kaj admiris lin kaj liajn talentojn. Li posedis kapablojn kaj elokventecon tre altgradajn ; kaj, kiel montras liaj multaj verkoj, li sin dediĉis al la Esperanta Movado kun forto, energio, kaj sindonemo. Li ellernis kaj flue parolis la lingvon, kaj cedis al neniu je sia admiro al la Dio-donita genio de Zamenhof, kaj je sia ŝato al la sanktula karaktero kaj eminentaj personaj virtoj de la granda Majstro. Eble, kvankam li ne sciis tion, li vidis en Zamenhof ian similecon al si mem, kaj li sin dediĉis kore kaj anime al la granda Afero kun egala fervoro kaj entuziasmo. La ĉefa celo de ambaŭ viroj estis servi al la homaro, kaj pli proksimen kuntiri homojn el ĉiuj nacioj kaj ĉiuj gentoj per la ligo de komuna neŭtrala internacia lingvo.”

La skribinto de tiuj vortoj estas John Pollen : pri kiu ĉiu konato lia konfesos, ke li ankaŭ meritis samajn esprimojn de honoro kaj estimo. Necesas tiaj pioniroj en movado kiel la nia ; kaj mortinte, ili lasas al aliaj sian spiriton por kuraĝigo kaj inspiro.

LA BRITA LITERATURA KAJ DEBATA SOCIETO : 1917—1923

En la jaro 1917, meze de la granda milito, kelkaj samideanoj en Londono priparolis la staton de nia movado, kaj la cirkonstancojn en kiuj novaj adeptoj tiam varbiĝis. Ili trovis, ke tiuj varbitoj ne havis sufiĉe da helpo en spertigado ; kaj ke estus tre bone se oni povus starigi debatojn, stimuli verkadon, kaj eldoni bonan literaturon, por anstataŭi la tiam nehaveblajn rimedojn. Aliaj konsiderindaĵoj sin prezentis : ekzemple, oni konstatis ke diversaj personoj elspezis tempon en la tradukado de anglalingvaj verkoj, nur trovonte poste ke jam ekzistas tradukoj de tiuj verkoj, ankoraŭ ne eldonitaj.

Tiaj ideoj instigis la aluditajn samideanojn al la penso, ke speciala Societo de spertuloj kaj spertigantoj multe efikus sur nian movadon en Britujo, kaj iagrade eĉ en aliaj landoj. Unue ili opiniis, ke tia Societo povus esti sekcio de la Brita Esperantista Asocio ; sed tio, pro diversaj tiamaj kialoj, montriĝis nekonsilinda. Tamen, la Societo unue starigis sub la titolo *B.E.A. Literatura kaj Debata Societo*, kaj ricevis moralan subtenon de la ĉefoj de la nomita Asocio. Poste oni ŝanĝis la titolon, kaj la Societo fariĝis memstara en nomo kaj ne nur en administracio.

Inter la fruaj laboroj de la Societo estis (1) la starigo de Debataj Kunvenoj en Londono, en kiuj estis permesate uzi nur la internacian lingvon, kaj kiuj efektive estis dum kelkaj jaroj tre efika plispertigilo por tiuj, kiuj havis la plezuron kaj privilegion ilin ĉeesti : (2) Literatura Enketo, pri anglalingvaj verkoj tradukitaj, tradukataj, kaj tradukotaj en Esperanton, kiu alportis tre utilan kaj gravan informon al la Komitato : kaj (3) Tradukaj Rondoĵoj, kies laboro ankoraŭ daŭras kaj kiuj certe donis multe da efika helpo al la partoprenantoj. Krom tio, la Societo komencis eldoni Teknikajn Vortaretojn pri diversaj temoj.

Sed alia tre grava afero estis la demando pri literatura gazeto, kiu iagrade anstataŭus la nehaveblajn internaciajn organojn. Unue, la Societo eldonis manuskriptan gazeton ; sed la bonveno farita al tiu modesta entrepreno kondukis al la starigo de kvaronjara presita gazeto, *Literaturo*, kiu nun aperis regule dum kvin jaroj kaj ankoraŭ aperos, kvankam sub novaj aŭspicioj. Tiu gazeto baldaŭ akiris multnombrajn kaj internacian legantaron, kaj ĝi estas nun konata kiel altgrada literatura organo de la Esperantista mondo.

Nune, la cirkonstancoj estas malsimilaj : multaj dummilitaj malfacilaĵoj malaperis, la Brita Esperantista Asocio havas pli elastan regularon kaj vigle funkcias, la samideanaro havas novajn okazojn por interrilato kun alilandaj amikoj ; entute, aparta bezono por la B.L. kaj D.S. ne same sentigas. Do, post zorga esploro de la demando, la Komitato de la Societo lastatempe metis antaŭ la membroj projekton por ebla kunfandiĝo kun la B.E.A., kiu projekto, per preskaŭ unuanima decido de la membroj, nun efektiviĝis. La B.E.A. akceptis la proponojn de la Societo, alprenis ties funkciojn, kaj aranĝis ne nur eldoni la gazeton *Literaturo*, sed ĝin dissendi senpage al siaj membroj.

Do, la Komitato de la B.L.D.S. adiaŭe salutas la membrojn de tiu Societo ; kore dankas ilin pro daŭra subteno kaj helpo dum la lastaj ses jaroj ; kaj, antaŭ ĝia eksiĝo, esprimas la esperon ke ĉiuj estintaj membroj plenforte subtenos la B.E.A. kaj la novan literaturan flankon de ĝia agado. Antaŭen al la venko !

LITERATURAJ KONKURSOJ, 1924.

1. Traduko de Angla Proza Literaturaĵo, de 2,000 ĝis 3,000 vortoj. 1a premio, 30ŝ. ; 2a premio, 20ŝ.
2. Originala Novelo, de 1,000 ĝis 2,000 vortoj. 1a premio, 30ŝ ; 2a premio, 20ŝ.
3. Originala Artikolo, de 1000 ĝis 2000 vortoj. Premio, 20ŝ.

Kondiĉoj :—

1. Konkursantoj devas alpreni pseŭdonimon, kaj skribi ĝin sur la manuskripton. Ili devas skribi la nomon kaj adreson—kune kun la pseŭdonimo—sur apartan folion, kaj enmeti ĝin en koverton, sigelante ĝin kaj skribante la pseŭdonimon ekstere. Tiun koverton ili devas sendi kun la manuskripto.

2. Ĉiuj manuskriptoj fariĝos la propraĵo de la Brita Esperantista Asocio. La Asocio rezervas al si ĉefajn rajtojn pri publikigo de manuskriptoj.

3. La Asocio rezervas al si la rajton, aŭ ne doni, aŭ dividi, iun ajn premion. Se manuskriptoj de sufiĉa merito estos ricevitaj, medalo aŭ medaloj estos ankaŭ aljuĝitaj.

4. Manuskriptoj, kun surskribo *Literatura Konkurso*, devas atingi la Asocion antaŭ Marto 31a, 1924.

REABONU !—Ni deziras atentigi ke abonoj por la jaro 1923 finiĝas per la nuna numero. Se vi ĝis nun ne sendis vian abonon por 1924 afable tion faru sen plua prokrasto.

Membroj de B.E.A. ricevos la gazeton senpage dum 1924 ; aliaj personoj devos pagi 2ŝ (aŭ 2½ svisajn frankojn) por la 4 numeroj.

NEPRE NOTU, KE DE NUN, ĈIUJ KOMUNIKAJĴOJ POR LITERATURO DEVAS ADRESIĜI AL LA BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 17, HART STREET, LONDON, W.C. 1.



Sewell, Presisto, Deal.